



BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Organ der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Fondita 1952

Numero 6

Novembro/Decembro 1963

Bilanco de la jarkunveno en Regensburg: LA REPUTACIO KRESKIS

La jarkunveno, kiu ŝajnis esti eksperimento antaŭ sep jaroj, konsolidiĝis kiel konstanta faktoro de nia tutjara laboro. 180 fervojistoj, inter ili 40 gastoj el 7 landoj, sekvis la inviton de GEFA por la jarkunveno 1963 al Regensburg, la tradicirika urbo en Bavario. Dank' al alloga programo la intereso de la publiko kaj fervojaj instancoj estis granda kaj la reago pozitiva.

„De jaroj akompanis nian kunvenon bela vetero“, asertis unu el la fidelaj partoprenintoj. Jes, li pravis. Rigardi la multturan urbon, el kiu altenstrebas la blankaj katedralaj turoj al la aŭtuna ĉielo aŭ promeni tra la multkolora foliaro de la antaŭstacidoma parko estis jam plezuro kontentiga. En la stacidomo informis afiŝoj pri la 7a jarkunveno de GEFA. Antaŭ la kongresejo („Kepler-Bau“) flirtis granda Esperanto-flago, kaj super la enirejo salutis larĝa ŝildo la alvenintojn. Interne bone funkcia akceptejo provizis ĉiun rapide per la necesa materialo, ĉefe per la indiko, kie oni loĝos. La distancoj ne maltrankviligis. Ĉiu vojo estis irebla piede dum kelkaj minutoj, agrabla faktoro por la malmultaj horoj de komuna kunesto, samkiel en la kongresejo estis eble preni bonkvalitajn manĝaĵojn tipe bavariajn. La necesaj salonoj kaj konferencaj ĉambroj estis je la dispono. Mallonge: la preparoj tiurilataj per la LKK estis modelaj kaj meritas la dankon de ĉiuj partoprenintoj.

Publika intereso

Antaŭ ol alvenis la kongresanoj, informis sin en speciala konferenco la lokaj kaj distriktaj ĵurnalistoj pri esenco kaj celo de nia movado,

precipe pri la graveco de la GEFA-jarkunveno. Ankaŭ reprezentantino de la sudgermana radiostacio intervjuis. Do la publiko trovis jam en la sabataj eldonoj objektivan kaj ĝenerale pozitivan resumon pri la venontaj aranĝoj. Sed ankaŭ dum la postaj du tagoj sekvis diversaj intervjuoj. La fakto, ke s-ro Barks, la organizinto de la pasinta IFEF-kongreso en Britio, havis oficialan komision transdoni donacon al la urbestro de Regensburg, ofertis konvenan okazon preparoli dum unuhora akcepto problemojn de la Internacia Lingvo.

Internaj laborkunsidoj

La strukturo de GEFA ne postulas la kutiman traktadon de estraraferoj. Pro tio restis sufiĉe da tempo por aliaj aktualaj problemoj. La estraro preparolis kun la delegito de la Sociala Servo, s-ro Rummel, la elstarajn okazintaĵojn de la pasinta jaro. La stato de la redakcia kaj varba laboro



Antaŭ la kongresejo „Keplerbau“

estis vaste diskutata kaj la kunlaboro kun aliaj sekcioj sur kultura tereno, la nefacila eldono de la fakvortaro, krome administraj kaj kasaj aferoj. La bilanco estis trovita bonorda. Ankaŭ la komisiitoj pri Esperanto en la distriktoj de la fervojaj direktoj ricevis dum plurhora konferenco detalan enrigardon en la variajn agadojn kaj raportis pri sia praktika laboro. La distriktoj agas relative memstare, kio povas konduki kelkfoje al nesufiĉa informigo por la estraro kaj redakcio. Ankaŭ la junularproblemo trovis ĝeneralan atenton. Esperable la kreskanta poresperanta intereso konsolidiĝos. Bonan modelon reprezentis la franca junulargrupo, kiu faris longan vojaĝon — nur pro la GEFA-jarkunveno. La komisiito en la distrikto Wuppertal, s-ro Graß, invitis la asocion por la jarkunveno 1964 al Solingen. La sekva jarkunveno okazos supozeble en Eßlingen.

Sukcesplenaj ekzamenoj

Jam de kelkaj jaroj estas enprogramitaj ankaŭ lingvaj ekzamenoj de ambaŭ kategorioj. Sub la lerta gvidado de la ekzamenkomitatestro d-ro Lang naŭ kandidatoj plenumis la ekzamenon de la lingva kapableco, inter ili unu blindulo (nefervojisto). GEFA kore gratulas al la sukcesintoj kaj instigas la aliajn same agi venontjare. Estas rimarkinde, ke GEFA disponas pri propra ekzamenkomitato. Ĝi laboras laŭ la direktivoj de la Esperanto-Instituto en München, kies direktoro Koch mem partoprenis la ekzamenon kiel observanto.

Memoroj pri la lasta IFEF-kongreso

Dimanĉon, antaŭtagmeze, oni sentis sin ankoraŭfoje reen lokigita al Stoke-on-Trent, la urbo de la IFEF-kongreso 1963. Sur la ekrano aperis multnombraj kolorbildoj pri la transmara vojaĝo, la mondurbo London, la neforgeseblaj kongresarangoj kaj la tuttaga ekskurso — belaj memorigoj, kiuj meritas esti montrataj al pli multaj. La sonbendo ebligis aŭskulti ankoraŭfoje la instigajn parolojn de la festoratoro, profesoro Lapenna, ke la fervojistoj utiligu Esperanton por fakaj celoj. Kun aplaŭdo la aŭskultintoj dankis al s-ro Ritterspach pro lia prezentado.

Festvespero en brila kadro

Kulmino de ĉiuj aranĝoj estis la festvespero. La salonegon plenigis ĉirkaŭ 250 gesamideanoj kaj gastoj, ĉefe el la fervoja medio. De la muroj kaj scenejo salutis Esperanto-flagoj kaj naciaj flagetoj, la GEFA-emblemo kaj bildo de Zamenhof. Ĉirkaŭe regis la kutima gajeco kaj spriteco. Ankaŭ novaj vizaĝoj estis konstateblaj, junaj, scivolemaj aŭ eĉ skeptikaj. Kiel trinkaĵo regis kompreneble la bavara biero. La akordeona orkestro „Cantu-



Akcepto per la urbestro

liana“ malfermis la vesperon per la uverturo de la opereto „Banditaj petolajoj“. S-ro König, la komisiito pri Esperanto en la fervoja distrikto Regensburg, salutis kore la ĉeestantojn en la nomo de la LKK. GEFA-prezidanto Gießner direktis sian salutvortojn al ĉiuj partoprenantoj en- kaj eksterlandaj kaj petis la honorgastojn kaj delegitojn el eksterlando pri alparolo.

D-ro Weiß en sia duobla funkcio kiel anstataŭanto de la fervoja prezidanto kaj reprezentanto de la Sociala Servo de Regensburg akcentis, ke ĉiuj klopodoj superi la lingvan konfuzon inter la popoloj meritas respekton kaj laŭdon. Kiel reprezentanto de la ĉefestraro de la Sociala Servo laŭdis s-ro Rummel la modelan laboron de GEFA kaj la idealismon de la samideanoj. Same en duobla funkcio kiel urbkonsilisto kaj funkciulo de la sindikato (GdED) salutis la aŭdantaron s-ro Trautner. Li esprimis sian ĝojon kaj surprizon pri la multflankeco de la fervojistaj gekolegoj.

La jarkunvenon salutis delegitoj el jenaj landoj:

- Aŭstrio per s-ro Geroldinger,
- Belgio per s-ro de Bryne,
- Britio per s-ro Barks,
- Francio per f-ino Vonay,
- Hungario per s-ino Illés,
- Nederlando per s-ro Blaauw,
- Svislando per s-ro Walder.

Nome de IFEF esprimis prezidanto de Jong sian kontentigon pri la kreskanta nivelo kaj la internacieco de la jarkunveno. „GEFA estas motoro en nia movado“, tiel li laŭdis la agadon kaj la reputacion de nia asocio. La vicon de la salutantoj finis s-ro Goppel kiel reprezentanto de la loka grupo kaj de GEA.

GEFA-prezidanto Gießner donis superrigardon pri la okazintaĵoj de la pasinta jaro. Lia jarraporto troviĝas sur paĝo 3 kaj 4.

Denove la akordeona orkestro kontribuis per la uverturo „En la regno de Indra“, kiu rikoltis longdaŭran aplaŭdon. Kiel bone povas servi ankaŭ

esperantigitaj kantoj, pravis recitativo kaj ario el la opero „Edziĝo de Figaro“. Anni Wiesmann akompanite de Hubert Maier prezentis ilin kun la matureco de lerta artistino. Salton al la humora flanko faris Michl Ehbauer, en Esperantujo vaste konata recitatoro kaj evidente unika artisto. Lia poemo bavardialekta pri la konstruado de la Babel-turo instigis al tondra ridado. Sed la salonego turmentis, kiam la poemo „La batalo kontraŭ la drako“, perfekta miksaĵo de bavara dialekto kun Esperanto, travivis sian premieron. Dankon pro liaj bonefikaj humorajoj. Birgitta Hauptenthal, 13jara junulino, recitis la konatan poemon „La poŝthelpisto sabrokrur“, kaj la orkestro adiaŭis per la marŝo „Longjaraj kamaradoj“.

Pli el 3 horoj restis ankoraŭ al la dancemuloj por uzi la gambojn en pli malpli modernaj dancoj. La parkedo estis glata, la orkestro ludema kaj la paroj muzikobcemaj, supozeble ĝuo por ĉiuj, kiuj havis la energion ĝisatendi la lastan dancon je la dua horo. Ekstere, sur la stratoj, regis mez-nokta kvieto.

Urbo en aŭtuna brilo

Regensburg akceptis siajn gastojn per la ĉarmo kaj beleco de tradicia urbo, kiu kapablas okulfrape demonstri siajn trezorojn. Multaj konstruaĵoj konserviĝis feliĉe kun siaj mezepokaj aŭ eĉ pli antikvaj karakterizaĵoj. Super la Danubo etendiĝas la impona ponto el ŝtono. Estis la senŝanĝa de la lasta milito, kiu grave difektis ĝin. Tie kaj tie altaj turdomoj demonstras la riĉecon de la tiamaj grandkomercistoj. Sub la aŭtuna suno kamparaj virinoj vendas siajn fruktojn. Antikva ankaŭ estas la urbodomo. Ni sidis sur benkoj en salonego, kie kunvenis dum jarcentoj reprezen-



GEFA-prezidanto Gießner dum la laborakunsido

tantoj de la imperiestro, eklezio kaj nobelaro. Tie estis la lulilo de la germana parlamento. Kiu deziris konvinkiĝi pri la krueleco de niaj antaŭuloj, rigardis en la torturkeloj originalajn instrumentojn de la tiama tribunalproceduro. Kia kontrasto al la heleco de la giganta gotika katedralo, kie dimanĉmatene episkopa diservo aliris multajn vizitantojn. Hele eksonis la sopranoj de la „regensburgaj paseroj“, fama horo de knaboj.

Por tiuj, kiuj volis ekkoni ankaŭ la ĉirkaŭaĵojn de Regensburg, LKK estis organizinta ekskurso al la iom pompa halo „Walhalla“. Pri la kultura valoro de la konstruaĵo en novgreka stilo oni povas malakordi. Sed la aŭtobusa ekskurso al tiu belega loko meze en la kolorriĉa arbaro estis granda plezuro. Ne mirinde ke la adiaŭaj vortoj por la organizintoj, f-ino Kammerer, s-ro Röder kaj s-ro Redlich venis el dankoplenaj koroj. Ĉio bone sukcesis kaj kuraĝigas inviti la venontan jar-kunvenon al Solingen.

Jarraporto

kompilita kaj prelegita de la prezidanto de GEFA, kol. Gießner, en la 7a jar-kunveno en Regensburg.

Nia sepa jar-kunveno kunvenis nin ĉi-foje en Sudgermanio, en tiu belega, samtempe antikva kaj moderna urbo Regensburg.

Kun granda ĝojo ni povas konstati, ke denove konsiderinda parto de nia membraro sekvis nian avokon kaj ke laŭ la agrabila tradicio de la lastaj jaroj ni denove povas bonvenigi multajn eksterlandajn amikojn. Neniel la celoj de nia Internacia Lingvo pli bone povas esti efektiviĝataj ol per tio, ke ni eluzas ĝin en tiaj vere kolegaj kaj amikaj kunvenoj internaciaj, ke helpe de tiu lingvo niaj personaj kontaktoj firmiĝas, nia reciproka kompreno de aliaj homoj, de fremdaj moroj plifortiĝas, ke nia estimo kontraŭ homoj el aliaj regionoj, kun aliaj opinioj pligrandiĝas. Se ni tiel komprenas la sencon de la jar-kunvenoj, ili tuteerte kontribuas al la celo de nia faka asocio kaj al la celoj de Esperanto entute.

Antaŭ ol doni la raporton, mi havas la malĝojan devon, memori pri la kata-

strofa tertremo de Skopje, pro kiu ankaŭ membroj de la tiea fervojista Esperanto-societo suferis. Ne estas konate al mi, ĉu iuj inter ili perdis la vivon, tamen multaj devis forlasi siajn detruitajn hejmojn, neniam plu revidos la meblojn kaj vestaĵojn, kiuj akompanis siajn posedintojn ofte jam tra jardekoj. Por iomete partopreni en la internacia helpkampanjo, GEFA transdonis en aŭgusto la sumon de 50 GM al la konto por la viktimoj de Skopje.

Kaj nun la raporto mem:

Generale oni devas diri, ke la laboroj en la GEFA-estraro lastjare suferis pro multaj malfacilaĵoj ĉefe de persona naturo. Ĉiuj estraranoj ofte dum longaj monatoj estis malhelpitaj en sia agado, ĉu pro forta dejora ŝarĝigo, ĉu pro longdaŭraj malsanoj aŭ kuracrestaĵoj. Estas kompreneble, ke pro tio ni ne povis solvi ĉiujn taskojn, kiujn ni volante estis solvintaj. Estas tamen diversaj punktoj, kiujn mi deziras tuŝi en ĉi tiu raporto, ĉar ilin ni povis trakti kun certaj rezultoj.

Kio koncernas la organizaĵon mem, ni menciis la ŝanĝon de la Esperanto-komi-

siito en la distrikto Stuttgart. La ĝisnuna komisiito, s-ro Roth, translokiĝis pro deĵoraj kaŭzoj. Anstataŭ li prenis sur sin la oficon s-ro Kiefer en Stuttgart. Kun la danko al s-ro Roth pro lia kunlaborado mi ligas la deziron al s-ro Kiefer, ke lia agado fariĝu prospera kaj alportu novajn impulsojn en la regiono de Stuttgart.

En mia lasta jarraporto mi menciis la centran GEFA-bibliotekon, kiu estas administrata de kolego Schiermann en Pöppenburg. Estas ĝojige, ke jam diversaj libroj estas postulitaj de li. El tio oni povas ekkoni, ke tia biblioteko estas necesa. Tamen mi akcentu, ke ĝia celo estas, provizi la membraron ĉefe per multekostaj kaj fundamentaj verkoj, kiujn la distrikaj bibliotekoj ofte ne povas aĉeti. Bonvolu rigardi ĉi-riilate la Bultenon n-ro 1 el la nuna jaro. Iam ni klopodos pliriĉigi la bibliotekon.

Konekse al tio mi denove atentigas vin pri la ebleco, senkoste pruntepreni amason da diversaciaj Esperanto-revuoj. Ankaŭ ĉi-riilate rigardu numeron 1/63 de nia Bulteno.

Kontentiga estas la nombro de **publicaĵoj** en nacilingvaj organoj pri la IFEF-kongreso, jarkunveno kaj lokaj okazintaĵoj. La informa, instrua kaj distra fakrevuo „Sozialblatt“, kiu aperas en eldonkvanto de 300000, enhavis ilustritajn artikolojn pri la kongreso same kiel pri la jarkunveno en Münster. La fakrevuoj „Die Bundesbahn“, „Rad und Schiene“ kaj „Bundesbahn-Mitteilungen“ foveble raportis pri la kongreso. En la „Sozialzeitung“ — informrevuo de kelkaj BSW-distriktoj — aperis artikoloj pri Esperanto, same en gazetoj de la sindikatoj kaj en la ĉiutaga gazetaro. Pluraj informoj aperis en la oficiala „Amtsblatt“ de kelkaj distriktoj. Dankon al ĉiuj, kiuj ĉi-maniere helpis disvastigi informojn pri nia afero en neesperantistaj medioj.

Jen mi ankaŭ raportas, ke la **Dokumenta Servo** de la Germana Federacia Fervojo denove envicigis en siajn kolektaĵojn la fakprelegan tekston el la kongreso en Stoke.

La Germana Esperanto-Asocio trifoje petis de la ĉefadministracio en Frankfurt la permeson pendigi **informtabulojn** en la plej gravaj germanaj stacidomoj laŭ la aŭstra modelo. Estas trege bedaŭrinde, ke tiu peto denove kaj ĉifine estas malakceptita. Ni esploras, ĉu eblecoj ekzistas atingi tiun delonge alstrebitan celon per aliaj rimedoj kaj per aliaj vojoj.

Pli kontentige ol lastjare evoluis la problemoj de **faka vortaro**. Post kiam en Stoke oni decidis eldoni unu provizoran terminaron, kies enhavon la landoj mem povas elektii, la vojo nun estas libera al vortaroj germana-esperanta kaj esperanta-germana. La preparlaboroj jam komenciĝis, la financio estas certigita helpe de la Sociala Organizaĵo. Dependas ankoraŭ de kelkaj personaj kaj eksteraj cirkonstancoj, per kia rapideco la verketo estos farata. Sed la metodo nun estas klara kaj ni klopedoj, kiel eble plej baldaŭ prezenti la novan fakvortaron.

En la daŭro de la pasinta jaro la grizverda **glumarko** de GEFA elĉerpigis kaj estas noveldonita per nova serio en la koloroj ruĝbruna kaj verda.

La germana fervojo eldonis komence de ĉi tiu jaro novan faldprospekton „Tra Germanio per la Federacia Fervojo“ en diversaj lingvoj, inter alie ankaŭ en Esperanto. Temas pri bela, multkolora landkarto kaj ilustritaj tekstoj. En multaj Esperanto-revuoj jam aperis tre pozitivaj recenzoj, kaj ne estas dubo, ke ankaŭ tiu varbilo same kiel la sep antaŭaj trovos multajn amikojn en tuta Eŭropo, eĉ en la mondo, kaj ke ĝi instigos multnombrajn samideanojn uzi la fervojn kaj rigardi la belajn de Germanio.

Fine vorton pri la IFEF-kongreso:

La germana asocio estis kontentige reprezentita de 85 personoj. En la diskutoj evidentiĝis, ke la dum la lastaj jaroj pli kaj pli grava situacio koncerne la IFEF-estaron iom post iom estas ekkonata de la plej multaj landoj, tiel ke nun speciala komisiono prilaboras novan sistemon, laŭ kiu estontece la estraranoj povos esti trovataj kaj kom-

pletigataj pli facile ol ĝis nun. Tion oni almenaŭ celas kaj esperas. Ankaŭ GEFA kunlaboradas en tiu komisiono en la persono de s-ro Barnickel, kaj la GEFA-estraro, al kiu s-ro Rummel el la ĉefestraro de BSW disponigas siajn valorajn spertojn, klopedas kontribui laŭforte al la plej taŭga solvo de la problemoj. Estas konsilinde, daŭre kaj atente legi la koncernajn raportojn en la internacia organo LIF resp. en la germana BULTENO.

Kun plezuro oni povas observi, ke en kelkaj landaj asocioj de IFEF ekestas iom pli da vigleco inter la junularo. Ne nur, ke de kongreso al kongreso pli da junaj vizaĝoj estas videblaj, ankaŭ la agado inter la junuloj vigligas kaj dum la kongresoj mem, kaj ĝenerale dum la jaro. Estas la sincera deziro de nia estraro, ke ankaŭ en Germanio la lokaj societoj ekkonu la gravecon de la junu-

lara problemoj. Al ĝi ni decidu niajn fortojn. Al la junaj homoj ni faru allogaj niajn rondojn. Ne nur seriozece, ankaŭ amuzado, dancado, kantado, migrado estu magnetoj por la junuloj. Ili ja ne volas Esperanton pro ĝi mem, sed kiel rimedon por agrablige de siaj junaj vivoj. La idealismo, kvankam grava kaj ne forpensebla, tamen estas duaranga. La banala vorto „Kiu havas la junularon, havas la estontecon“ tutcerte estas vera. Ni apliku ĝin tiucele, ke ni modifas la konatan sloganon „Ĉiu membro varbu ĉiujare minimume unu novan membron“ en la pli trafan sloganon: „Ĉiu membro varbu en tiu jaro minimume unu junulon!“ Vi kaj vi kaj vi — sentu vin ĉiuj respondecaj! Bonvolu vi ĉiuj helpi, ke la vojo de nia asocio kondukos supren, laŭ la nombro de niaj membroj kaj precipe laŭ la kvalito de nia agado.

7. Jahresversammlung in Regensburg

Die Vereinigung deutscher Eisenbahner - Esperantisten (GEFA) hielt am 19. /20. Oktober 1963 in Regensburg ihre 7. Jahresversammlung ab, die in Presse und Öffentlichkeit starke Beachtung fand. Der Bürgermeister empfing einen englischen Gast sowie Vertreter des GEFA-Vorstandes zu einem längeren Gespräch. Der Arbeitsauschuß für Esperanto befaßte sich mit Fragen der Organisation und Werbung sowie dem kommenden Kongreß des internationalen Verbandes in Brüssel.

Die Bezirksbeauftragten erhielten einen Überblick über aktuelle Probleme und berichteten aus ihrer Arbeit. An den Sitzungen war der Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerkes durch Herrn Rummel vertreten.

Neun Kandidaten, darunter ein Blinder, beteiligten sich an der Sprachprüfung, die von Prüfungskommissaren aus den Reihen der Eisenbahner-Esperantisten geleitet wurde. Ein Lichtbilder/Tonbandvortrag weckte Erinnerungen an den diesjährigen internationalen Kongreß in England.

Höhepunkt der Veranstaltungen bildete der Festabend, an dem sich etwa 250 Personen beteiligten. Abt.-Präsident Dr. Weiß überbrachte die Grüße des Präsi-

denten der Bundesbahndirektion Regensburg und hob hervor, angesichts der Sprachschwierigkeiten könne man den Bemühungen der Esperantisten seinen Respekt und seine Bewunderung nicht versagen. Herr de Jong, der Präsident des internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten, lobte die Arbeit des deutschen Landesverbandes, die wie ein Motor bei den anderen Organisationen wirke. Die Grüße ihrer Kollegen überbrachten ausländische Gäste aus Belgien, England, Frankreich, den Niederlanden, Österreich, der Schweiz und Ungarn. Über die Arbeit im vergangenen Jahr berichtete GEFA-Vorsitzender Gießner:

Der Sinn unserer Jahresversammlungen liegt zweifellos auch darin, daß mit Hilfe der internationalen Sprache das gegenseitige Verständnis und die Achtung vor Menschen anderer Länder und Ansichten gefördert werden.

Die Arbeit des Vorstandes hat im vergangenen Jahr sehr unter Schwierigkeiten durch Krankheiten und stärkste dienstliche Beanspruchung gelitten.

Im Bezirk Stuttgart hat der Bezirksbeauftragte für Esperanto gewechselt. Kollege Kiefer hat das Amt übernommen.

Die zentrale Bücherei, die vor allem kostspieligere Werke der Esperanto-Literatur enthält, wird gern in Anspruch genommen. Desgleichen können die verschiedensten ausländischen Esperanto-Zeitschriften kostenlos entliehen werden (vgl. „Bulteno“ Nr. 1/63).

Veröffentlichungen, z. T. bebildert, über unseren internationalen Kongreß, die Jahresversammlung in Münster und

andere Veranstaltungen sind in großer Zahl in der deutschsprachigen Fach- und Tagespresse erschienen. Der Dokumentationsdienst der DB hat den Fachvortrag, der im 15. IFEF-Kongreß in Stoke-on-Trent (England) gehalten wurde, in seine Verzeichnisse aufgenommen.

Der deutsche Landesverband bereitet die Herausgabe eines Eisenbahn-Fachwörterbuches Deutsch-Esperanto und Esperanto-Deutsch vor. Geplanter Inhalt etwa 2500 Wörter.

Die bekannte grau-grüne Brieferschlußmarke „Esperanto Deine zweite Sprache“ ist vergriffen. Sie wurde in den Farben braunrot-grün nachgedruckt. Die DB gab abermals ein Esperanto-Faltblatt heraus, dieses Mal unter dem Titel „Durch Deutschland mit der Deutschen Bundesbahn“.

Zum Schluß enthält der Jahresbericht die Feststellung, daß die Beteiligung der Jugendlichen allgemein in erfreulicher Weise zunimmt und alle Anstrengungen gemacht werden sollen, um den Jugendlichen die Beschäftigung mit der Internationalen Sprache und ihre Anwendung erstrebenswert zu machen.

Ĉu IFEF bezonas novajn statutojn?

Se levigas tia demando aŭ simile formulita, sekvas baldaŭ la dua demando pri la motivo. Ĉu IFEF efektive troviĝas en kriza periodo? Por ne timigi skeptikulojn ili estu trankviligataj: IFEF ne travivas danĝeran periodon. Kontraŭe, laŭ nombro de siaj membroj kaj ĝenerala reputacio IFEF atingis certan kulminon. La ĝisnuna laboro estis bona.

Tamen, internacia federacio devas atenti ankaŭ la estontecon. Se ĉio bone marŝis ĝis nun, tio ne signifas ke tiu memfido povas daŭri. Unuaj malfacilaĵoj donis jam kelkajn antaŭsignojn. Ekz. la problemoj trovi taŭgajn estraranojn aŭ serĉi komisiitojn por specialaj taskoj fariĝis aktuala pli kaj pli.

Je tiu tempo evoluis la nocio de „komitatano“. La iniciatoroj vidas en la komitatanoj gremion de laborkapablaj reprezentantoj el (ne de) la landaj organizoj. La nombro de tiu elito estas el-kalkulata laŭ speciala ŝlosilo. Po 200 membroj (pagintaj) sian

Der Festabend wurde musikalisch durch ein Harmonika-Orchester sowie durch Gesangseinlagen in Esperanto umrahmt. Großen Beifall fanden die humoristisch-poetischen Einlagen. Alte und neue Tanzweisen lockten bis weit nach Mitternacht viele Paare auf das Parkett.

Die Teilnehmer äußerten sich sehr lobend über den gelungenen Ablauf der Jahresversammlung. Auch die Stadtführung öffnete den Blick in die geschichtreiche Vergangenheit der Donaustadt.

Den Abschluß bildete ein Omnibusausflug, der ebenfalls von sonnigem Herbstwetter begünstigt war. Auf Wiedersehen bis zum Oktober 1964 in Solingen!

IFEF-kotizon kompreneble) estas reprezentataj per unu komitatano. Tiuj maksimume 25 personoj estonte respondecu persone la sorton de IFEF, oni argumentis.

Bedaŭrinde la pluj riprensoj renkontis novajn problemojn. Por nur mencii kelkajn el ili: Kiu havos la decidrajton, la gremio de la komitatanoj aŭ — kiel nun — la IFEF-estraro dum 51 semajnoj kaj la delegitaro dum unu kongressemajno? Ĉu necesos inter la komitatanoj la elekto de afergvidanto, kiu prizorgos formalajn taskojn ekz. kolekton de proponoj kaj decidoj aŭ publikigon de la neevitebla adresaro? Kiun rolon ludos la landaj asocioj, ĉefe en la kazo, se komitatano agos kontraŭ la koncepto de sia landa organizo?

Tiuj demandoj estis esplorataj ĝisfunde ekde la pasinta IFEF-kongreso. Speciala seskapa komisiono ekzamenis la konsekvencojn. Ĝi bezonas supozeble monatojn sole por demonstri sian koncepton. Jam dum la

kongreso estis decidite formi la gremion de la komitatanoj. La nomigo flanke de la landaj organizoj komenciĝis, sed — kiel kutime — kelkaj landaj organizoj tute ne reagis. Se jam la nomigo de la kandidatoj kiel la unua paŝo ne funkcias, oni devas demandi sin, ĉu la sistemo de nomigitaj komitatanoj entute estas ideala kaj profitdona al IFEF.

Eble la iniciatoroj vidas en la komitato de UEA kopiindan modelon. Sed oni ne forgesu, ke UEA, kiu ĉefe celas havi individuajn membrojn, ne povas esti komparata kun la federacia strukturo de IFEF. La landaj organizoj fondis en 1948 la federacion, kaj nur ili rajtas decidi pri principaj taskoj dum la tuta jaro. Dank' al la sindona laboro de la IFEF-estraranoj la laboro estas bone farita. Tamen la tempo ŝajnas esti matura, ke la ĝisnuna „regulato“ estas anstataŭenda per „statutoj“, kiuj klare indikas la kompetencojn, kiuj bazas sur demokratiaj principoj sen limigo kaj kiuj donas al respondecaj organoj ankaŭ rajtojn. Ne povas esti dubo, ke la komitato estas la legislativa instanco, dum la estraro estas la eksekutiva. La rolo de la IFEF-sekretario devus esti liganto inter komitato kaj estraro. Li akceptas proponojn, ekzamenas ilin laŭ la statutoj, zorgas pri la publikigo kaj transdonas la decidon de la komitato al la estraro.

La komitato funkcia kiel legislativo povas konsisti laŭ sia naturo nur el reprezentantoj de la landaj organizoj. Tiuj personoj, kiuj nomis sin ĝis nun delegitoj kaj funkciis dum nur la kongressemajno, estonte havus decidrajton en la nomo de sia landa organizo dum la tuta jaro. Ekzistas ankoraŭ la imago, ke nomigitaj komitatanoj laboras pli fruktedone por la bonfarto de IFEF ol la iom* anonime aspektantaj landaj organizoj. Sed: landaj organizoj ĉiam estas atingiblaj, nomigitaj komitatanoj eventuale ne. Oni bezonas por

la ĉi lastaj oftajn ŝanĝojn en la adresaro. La tuta laborproceduro fariĝas peza kaj temporaba.

Pri la gvidprincipo en IFEF la kompetentuloj jam konscias, pri la praktika funkcio de la

komitato ankoraŭ ne. IFEF ne staras sola en la mondo kun tiu problemo. Eble la statutoj de aliaj organizoj, kiuj ne nepre devas esti esperantistaj, povas servi kiel modelo.

bestro de Bregenz, en longa ĉeno sinsekvis prelego post prelego. La laŭ enhavo tre interesa referato pri la historio de Bregenz bedaŭrinde maltrafis sian celon pro la malĝusta elekto de la preleganto. Des pli interesaj estis la kontribuoj de s-roj Rispy (Svisujo) pri liaj spertoj koncerne „ŝteldon“ de svisaj anoj el la franca fremdullegio, de Pickel (Nürnberg), sekretario de la Germana Esperanto-Asocio, pri novaj varbmetodoj kaj alia pri la kelkdeko da eŭropaj lingvoj, de W. v. d. Ley (Taifingen) pri spertoj de Esperanton parolantaj infanoj kaj de pastro Burckhardt (Germanio) pri ĝojigaj faktoj el la varbkampanjo.

Estas memkomprenebla, ke dum tia renkontiĝo estis renovigitaj personaj kontaktoj, kiuj helpe de nia komuna lingvo eĉ bonege funkciis inter la diversaj germanlingvaj dialektanoj.

- esp -

Fabelo

Reĝo en Azio ludis ŝakon kun unu el siaj ministroj. Kelkaj ministroj ĉirkaŭstarante observis la ludon. La reĝo perdis kaj asertis, ke sia kontraŭulo estis farinta malĝustan movon. Li koleris trege. La eminentuloj restis silentaj.

Alia ministro alvenis. „Vi decidu“, diris la reĝo al li, „kiu perdis?“

„Via moŝto perdis!“ respondis la ministro sen pripensi.

„Kiel vi povas diri tion“, protestis la reĝo, „sen scii, pri kio entute temas?“

„Tio ne estas malfacile, via moŝto“, diris la ministro. „Se la ŝajno de la justeco estus sur via flanko, tiuj sinjoroj ne silentus tiel obstine!“

En la junuleco oni kredas, ke la minimumo, kion la vivo ofertas, estas la justeco. En la maljuneco oni scias, ke ĝi estas la optimumo. Marie von Ebner-Eschenbach

Fahrplankonferenz über Esperanto

Dem wiederholten Vorschlag der österreichischen Esperantisten, den Textteilen des Kursbuches auch eine Fassung in Esperanto beizufügen, hatten die Österreichischen Bundesbahnen (ÖBB) bisher nicht entsprochen. In ihrem Schreiben an die „Gesellschaft für Internationale Verständigung“ in Wien erklärten sie sich nunmehr bereit, die Frage des Abdrucks der „Allgemeinen Bemerkungen“ im Kursbuch anlässlich der nächsten Reisezugfahrplankonferenz zur Diskussion zu stellen. Die Konferenz fand unter Beteiligung aller europäischen Eisenbahnen Ende September 1963 in Sofia statt.

Bei der Beratung über diese Frage wurde entschieden, es in das Ermessen jeder Eisenbahnverwaltung zu stellen, Textteile des Kursbuches in der Internationalen Sprache herauszugeben. Diese Lösung ermöglicht es jeder Eisenbahnverwaltung, in Zukunft die Entscheidung über die

Verwendung des Esperanto für kundendienstliche Zwecke auf Grund ihrer eigenen Einstellung zu treffen.

Erstmals wurde damit die praktische Verwendung des Esperanto auf einer internationalen Reisezugfahrplankonferenz beraten.

10 Jahre DB-Fahrplan in Esperanto

Die Deutsche Bundesbahn hat sich vor 10 Jahren entschlossen, im Kursbuch und später auch im Reisefahrplan einen Teil der Texte (Abkürzungen bzw. Hinweise) in der Internationalen Sprache zu veröffentlichen. Seitdem sind etwa 3 Millionen Fahrpläne mit den Textteilen in Esperanto erschienen, eine wertvolle Hilfe für alle Reisenden, die mit den herkömmlichen Sprachen nicht zu erreichen sind. Eine Reihe anderer Eisenbahnverwaltungen ist diesem Beispiel inzwischen gefolgt.

Trilanda renkontiĝo en Bregenz

Okazis la unuan fojon, ke anstataŭ la kutimaj regionaj kunvenoj en Vorarlberg, Orient-svisujo kaj la germana teritorio norde de la Lago de Konstanco oni aranĝis komunan trilandan renkontiĝon. Bregenz, unu el la perloj laŭlonge de la lagobordo, estis elektita pro sia favora situo kaj siaj multnombraj vidindaĵoj. Kunvenis proks. 100 gesamideanoj, inter ili fervojistoj, el la tri landoj. Ĉefaj punktoj el la programo estis distra vespero, enhaviĉa laborkunsido, gvidado tra la urbo kaj grimrado sur la Pfänder-monton (1064 m) laŭ moderna, persnurfervoja metodo, kompreneble por ŝpari la energiojn por la kunsido.

La programo de la 1a parto estis vere abunda, eĉ iom tro. Alternis kolorbildaj prelegoj pri Vorarlberg kaj la konata kampadejo Primošten en Jugoslavio (sed oni nenion vidis pri la ticia „Esperantujo“), hungaraj popoldancoj kaj ĝenerala danckonkurado, eĉ celindaj premioj. Kaj ni ne forgesu „Svisason“, la faman sorĉiston kaj ventroparoliston el Bern, kiu ne nur sorĉis akvon el kutime leginda gazeto kaj kantigis sian belan pupon eĉ en Esperanto, sed kiu krome humorplene gvidis dum preskaŭ kvar horoj de programero al programero.

La laborkunsidon gvidis nia konata kolego Walder el Svisujo. Post bonvenaj vortoj de la ur-

El la grupoj

Duisburg-Wedau. La loka BSW-grupo festis la 20an de oktobro sian 50jaran jubileon. Antaŭ 800 partoprenantoj la festoratoro i. a. laŭdis afable la laboron de la tieaj esperantistaj fervojistoj kaj transdonis donacon al la grupa reprezentanto s-ro Kirchengens. La varbiloj „Esperanto auf einem Blatt“ estis disdonataj.

Frankfurt. La grupo aranĝis la 12 an de oktobro posttagmezan ekskurson al la idilia vilaĝo Heusenstamm apud Offenbach. La aŭtuna suno tre favoris la multajn promenantojn. — En la direkcia konstruaĵo la novaj aŭŝoj altiras la atenton de multaj geologioj.

Nürnberg. La urba grupo, la unua de la mondo, festos la 13an de decembro sian 75jaran jubileon en la impona salono de la trafikmuzeo kune kun la fervojista grupo.

Rheydt. En la presita programo de la loka BSW-grupo okaze de la amuza vespero (6. okt.) troviĝas du varbanoncoj pri Esperanto.

Stuttgart. En la tica distrikto fortaj instigoj estas donitaj de la nova komisiito Kiefer per rondletero. En oktobro komenciĝis kurso por komencantoj.

Atentu la jarkotizon!

La membroj de GEFA estas petataj pagi eble plej baldaŭ la jarkotizon de GEFA / IFEF (2,50 gm) al siaj distriktkomisiitoj. Tiu volu transĝiri la sumon ĝis februaro 1964 al la konto de la GEFA-kasisto en Frankfurt.

GEFA

HUNGARA FERVOJISTA MONDO, grandpaĝa revuo, okupiĝas (en n-ro 2) kun amo kaj kapableco pri la pasinta IFEF-kongreso. Eĉ ne mankas desegnaĵoj.

Informa Bulteno de la Itala Fervojista Esperanta Asocio direktas la atenton al la fervojista renkontiĝo en la kadro de la pasinta UE-kongreso.

Jugoslavia Fervojisto elstarigas (en aŭg.) la gravecon de la UE-kongreso kaj la raĝon post la tertrema katastrofo en Skopje.

La Funelo / Der Trichter eldonita en Nürnberg, estas en n-ro 3 la praktikan uzadon de la internacia Lingvo per la Germana Federacia Fervojo kaj la agadon de GEFA.

La Gazeto, eldonita en Francio, anoncas (en marto-julio), ke la krimalfilmo „Angoroj“ estas finita en Parizo tute kun Esperanton parolantaj aktoroj. Daŭro: unu horon, larĝeco: 16 mm.

La Fervojisto, eldonita de la franca IFEF-sekcio, atentigas (en okt.) pri reorganizo de la FFEA-kunveno kaj pri la kreskinta membronombro.

ORBITO, aperinta en Usono, karakterizas (en n-ro 3 kaj 4) precipe la usonan vivnivelon.

Regensburger Stadtanzeiger ŝirindas sub la ŝirifto „Internationaler Festabend ohne Sprachschwierigkeiten“ den erfollreichen Jahreskongreß unserer Vereinigung.

Die „Mittelbayrische Zeitung“ befaßt sich eingehend über Wesen und Ziel der Eisenbahner-Esperantisten.

Der neue Tag hebt hervor, daß hinter der Sprachenbegeisterung der Esperantisten ein ernster Wille steht.

Ni legis en...

BEFA-Infornilo, organo de la Belga Esperanta Fervojista Asocio, donas (en sept.) grand-skalan superrigardon pri la programo de la venonta 16a IFEF-kongreso en Bruselo. I. a. folkloro grupo el Beograd partoprenos. Al la vizitotaj lokoj apartenas la atomcentro en Bokrijk. Postkongreso estos projektata en Anvers kaj Amsterdam.

Budhana Kuriero, eldonita en Belgio, akuzas per speciala eldono la politikreligian konflikton en Sud-Vjetnamo.

DEFA-Bulteno de la Dana Esperantista Fervojista Asocio amplekse raportas pri la nefacila vojaĝo al la UE-kongreso en Sofio.

Das Gewerkschaftsorgan **Der Deutsche Eisenbahner** bringt

in der Sept.-Ausgabe einen Leserbrief unter der Überschrift „Mit Esperanto geht's besser“.

Esperanto en Skotlando publicas (en n-ro 12) ĝenerale interesan intervjuon kun la esperantista veterano David Kennedy.

FERVOJISTO, organo de la Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda, priskribas (en okt.) perfervojan vojaĝon tra Aŭstrio.

FRANCA ESPERANTISTO prezentas (en okt.) per la Franca Kroniko la staton de la nuntempa Esperanto-movado.

Granda Moravio titoliĝas bildita broŝuro pri la arkeologia historio, kiun eldonis Parko de Kulturo, Brno (Ĉeĥoslovakio).

Diversaĵoj

En Adelboden (Svislando), Chalet Egghaus, Boden, estos aranĝata, ĉefe por la junularo skiferioj de la 26a de decembro 1963 ĝis la 4a de januaro 1964. Prezo: 105 svisaj frankoj ekskluzive deviga asekuro kaj veturilkostoj. Informoj kaj aliĝoj per: f-ino Cosette Giroud, Jonquilles, **La Chaux-de-Fonds**, Svislando.

Ekzistas certaj ŝancoj, ke en Freilassing (Bavario) la urbkonsilantaro decidus nomigi unu novan straton honore al d-ro Zamenhof, se eble plej multaj esperantistoj direktos petskribojn al la urbestro resp. al la urba konsilantaro de **Freilassing**. Germanoj nepre skribu germanlingve en deca maniero.

Svisa esperantisto Franz Rispy savis multajn legionsoldatojn servintajn en la franca kolonialarmeo. Pri siaj multaraj bataloj kaj sukcesoj li skribis rekomendindan germanlingvan libron „Sie klagen an“, eldonitan de „Riza“-Verlag, **Zürich 35**, Postfach, Svislando.

Korespondadon kun germanaj fervojistoj pri fotografado, sporto, muziko kaj turismo deziras: Harry Våljari, Saarpene 9, **Tallin 9**, (Estonio), Sovetunio.

La Internacia Foiro de 1964/65 en New York alproksimiĝas. Tiurilataj proponoj kaj sugestoj estas bonvenaj por la kunlaboro de la Esperanto-klubo de UNO. Skribu al: S-ro F. Martinez, Esperanto Scientific Center, 130 West 57th St. (6 - B), **New York 19**, (N. Y.), Usono.

La Esperanto-klubo de UNO en New York malfermis poresperantan varb-kampanjon. Oni petas sendi seriozajn instigajn leterojn el profesia aŭ praktika vidpunkto al: S-ro U Thant, Secretary General, United Nations, **New York**, N. Y., Usono.

La televida stacio 13 en New York interesiĝas elsendi kurson pri Esperanto. Sendu instigajn skribaĵojn al: Stacio 13 c/o s-ro D. W. Hoffman, 1444 Leslie St. Hillside, **New York**, N. Y., Usono.

Mi ne timas . . . ,
ke Germanio ne
unuigos,
niaj bonaj ŝoseoj
kaj estontaj fervojoj
plenumos sian taskon.
Sed precipe akordu
en amo unu al la alia
kontraŭ la ekstera malamiko!
Estu unuece, ke la
germana talero kaj groŝo
en la tuta regno
havu saman valoron;
unuece, ke mia kofro
trans ĉiuj
tridekses ŝtatoj
povus pasi sen malfermo.
Estu unuece,
ke la urba pasporto
de vejnara burĝo
per la doganistoj
de najbara ŝtato
ne estu taksata
pli malvalida
ol la pasporto de eksterlandano.
Inter germanaj ŝtatoj
ne plu estu la parolo
pri enlando
kaj eksterlando.

Goethe (1828)



**Ni deziras
al ĉiuj en- kaj
eksterlandaj
geamikoj
GAJAN
KRISTNASKON
KAJ FELIĈAN
NOVJARON!**

GEFA-estraro